9a Belga Esperanto-Kongreso St.Gilles 1920

Francine Sperber (‘birdino’), 23.8.2018:

(El Historia Skizo de Esperantista Brusela Grupo : 1907 - 1957. Verkita de Elly STAES, arkivistino, « Je memoro de mia Patrino ». Okaze de la Ora Jubileo 1907 - 1957. Paĝoj 3 ĝis 21.

1914-1918

Ve! Okazas la Unua Mondmilito kaj tuta movado por pluraj jaroj dormetas.

1920

Tamen en 1920 la Federacio de Bruselaj Grupoj ĉiam sub prezidanteco de James Van Drunen kaj sekretarieco de F-ino Jennen konfidas al la grupo "Antaŭen" la organizon de la unua postmilita kongreso ; tio estas la 9-a Belga Kongreso.

Ĝi okazas en Saint-Gilles (~ "kvartalo" de Bruselo-Regiono) sub prezidanteco de S-ro Cogen, kun ĉeesto de Profesoro Van Drunen kaj D-ro Paul Otlet, kaj dank'al la nelacigeblaj klopodoj de F-ino Jennen kaj S-ro Mathieux.

La tagordo estas gravega, ĉar temas pri la reorganizado de la laboro post la dummilita paŭzo.

Tre interesa estas la inaŭguro de la Esperanta Ekspozicio en la lernejo kie oni preparas knabojn fariĝi instruistoj (~ "Ecole Normale", Bulevardo Lemonnier, nun nomita "Ecole Normale Charles Buls").

Mankas al tiu kongreso nek oficiala akcepto fare de la urbestraro, nek frata festeno, nek arta festo al kiu partoprenis kiel aŭtoroj : S-ro Cogen, S-ro Somerling, F-ino Colyn.

Eksterlandaj kaj belgaj esperantistoj kune promenadas lundon al Tervueren (~ bela loko sude de Bruselo) por fini verde tiun verdan feston.

Jen aktuala foto de la urbdomo (aŭgusto 2018). La kongresa foto estis farita en la angulo dekstra aŭ maldekstra (en ambaŭ lokoj estas simila pordego).